

Leterujo, 2-a parto
Claude Gacond, 241-a radioprelego, 1968.05.22 & 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En nia leterujo mesaĝoj de geaŭdantoj amasiĝis. Kun plezuro ni hodiaŭ ilin malfermante profitas tiun okazon por peronde babili kun vi, karaj geaŭdantoj.

A.- La Esperanto-Societo en Mulhouse, Francio, diras sian intereson por niaj disaŭdigoj. Kiel multaj geaŭdantoj ili aldonas:

Cl.- « *Estus al ni agrable, se tiuj programoj povus esti iom pli longaj, kaj esti aŭdeblaj ankaŭ sur mezaj ondoj (400 kaj 580 m), se eble.* »

A.- Tiu tago certe venos, kiam la esperantistoj pli abundos. Esperantujo havas radio-elsendojn, kiujn ĝi meritas. Pli multe la esperantistoj avertos la radio-elsendejojn pri sia ekzisto, des pli la elsendoj mem tendencos longigi kaj invadi aliajn ondolongojn. La grupanoj en Mulhouse bedaŭras la rabon de tempo por teknikaj anoncoj. Aŭdu :

Cl.- « *Okaze de tiu skribaĵo ni sciigas al vi, ke la ĉiufoja anonco de la teknikaj indikoj (antaŭ la programo) pri la kilohercoj kaj la ondlongecoj estas teda, tempo-raba (po 1 minuto !) kaj eĉ tute sen-utila afero.* »

A.- La kontraŭan opinion esprimas tri aŭdantoj : sinjoro Walter Kaukal en Neustadt-Weinstrasse, sinjoro Hansdieter Platz en Sankt-Martin kaj sinjoro Herbert Blumenstiel en Maikammer, Okcidenta Germanio. Ili diras :

Cl.- « *Precipe ni ĝojas pri tio, ke sinjoro Gacond komencas solene ĉiun esperanto-elsendon per la vortoj kaj ili reskribas nian anoncon.* »

A.- Por ili kiel por multaj aliaj geaŭdantoj tiu momento ebligas reguligi la radio-aparaton. Ofte unu ondlongo ne estas bona. Tiam estas kelkaj sekundoj por rapide kapti alian. Kaj por tiuj, kiuj nin malfacile kaptas, ni citas la dirojn de sinjoro Harri Laine en Nupuri, Finnlando :

Cl.- « *La lundan elsendon, kiun mi plej multe aŭskultas, mi aŭdas plej bone sur la frekvenco 21520 kilohercoj (por Afriko). La aŭdebleco estas tre kontentiga, precipe pro foresto de perturboj.* »

A.- Ni ofte rimarkis, ke ondoj orientitaj por unu direkto estas facile kaptataj en la kontraŭa direkto. Ofte tiuj ondoj turnas la tutan planedon. Vi sciu, ke similaj informoj estas ege utilaj al nia elsendejo. Nur vi, karaj geaŭdantoj, povas nin helpi plibonigi nian aŭdkvaliton.

Cl.- El la Esperantista Kulturdomo Grésillon, Francio, salutis grupo da amikoj, kiuj aŭskultas niajn elsendojn eĉ dum la ferioj.

A.- El la sama lando venis salutoj de sinjoro Gaston Vidal en Chamalières, sinjoro Henri Coulon en Montbéliard kaj fraŭlino E. Kohler en Besançon. Tiu lasta samideanino diras :

Cl.- « *Ni registras viajn elsendojn kaj ilin reaŭskultas kun esperantaj amikoj.* »

A.- Ni revenu al Okcidenta Germanio. Salutis sinjoro Norbert Merkens en Barmen.

Cl.- Kaj niaj ondoj ne okupiĝas pri la fera kurteno. El Orienta Germanio venis mesaĝo de sinjoro Helmer Koch en Jena.

A.- La letero de tiu samideano informas nin, ke ni havis la honoron veki interesan diskuton en la esperanto-grupo de tiu urbo.

Cl.- Temas pri niaj prelegoj pri la historio de la internacia lingvo, kiu aperas poste en *Sennaciulo*. Kiel ni konstatas per multaj leteroj, niaj geaŭdantoj relegas niajn dirojn en tiu gazeto.

A.- Sinjoro Helmer Koch diras :

Cl.- « *Hazarde mi prunte ricevis numeron 4/1967 de **Sennaciulo**, kun granda intereso mi tralegis ĝin, precipe vian tre valoran artikolon... En ĝi mi trovis la frazon :*

A.- *Neniam malriĉa okulisto povintus akurate plenumi tiun promeson.*

Cl.- *La formo **povintus** altiris mian atenton, ĉar mi neniam antaŭe legis ĝin aŭ similan formon. Dum la lasta kunveno de nia esperanto-grupo ni priparolis ĝin kaj provis konjugacii verbojn en pasinteco... Ni ne sukcesis klarigi la aferon per libroj – plenan gramatikon neniu el ni posedas, kaj ni decidis laŭ nia lingvosento. Al mi **povintus** pli bone plaĉas ol **estus povinta**, sed niaj opinioj disiĝis. Ĉu vi havas tempon kaj emon klarigi la aferon al ni per kelkaj linioj aŭ vortoj ? »*

A.- Ni profitas tiun demandon por direkti nian babiladon al tiu lingva punkto.

Cl.- Ni nin foje permesas la uzon de formoj ne instruataj en la lernolibroj kaj ne oftaj en la ĝenerala uzo ĝuste por instigi niajn geaŭdantojn malkovri la riĉecon de nia lingvo.

A.- En 1905, dum la unua Universala Kongreso, *Fundamento de Esperanto* estis akceptita. Ĝi garantias al nia lingvo stabilecon. Sur tiu Fundamento la lingvo konstruiĝas. La gramatikaj reguloj ĝeneraliĝas. Kaj novaj gramatikaj eblecoj ekaperas.

Cl.- Ekzemple per adjektivoj oni senpere ekformas verbojn. La adjektivo **rapida** permesis formi la verbon **rapidi**. Kaj hodiaŭ patrino tendencus diri al sia infano :

A.- *Rapidu !*

Cl.- anstataŭ

A.- *Estu rapida ! aŭ Agu rapide !*

Cl.- En nia Fundamento nenio malhelpas verbigi ne nur adjektivojn, sed ankaŭ participajn adjektivojn. En religiaj kantoj mi trovis la formon :

A.- *Laŭdatu Dio !*

Cl.- por

A.- *Estu laŭdata Dio !*

Cl.- kio estas gramatike absolute ĝusta. Kaj anstataŭ diri:

A.- *Se vi estus veninta, vi estus povinta vidi belan filmon*

Cl.- mi pensas, ke estas gramatike absolute ĝuste diri:

A.- *Se vi venintus, vi povintus vidi belan filmon.*

Cl.- Eble kelkaj geaŭdantoj timos uzi tiun pli densan formon. Ili restu fidelaj al la **us-inta**-uzo. Aliaj povos amuziĝi ekprovi la **intus**-formojn. Gravaĵo estas neniel sistemigi unu el la uzoj kaj tiel garantii al nia lingvo stil-liberecon.

A.- Kio estas grava, tio estas bone distingi la signifon

Cl.- **se vi venus**

Leterujo, 2-a parto
Claude Gacond, 241-a radioprelego, 1968.05.22 & 25

A.- de la signifo

Cl.- **se vi estus veninta.**

A.- Tro ofte, kaj ĉefe la ĝermanoj, ne precize sentas tiun diferencon. **Se vi venus** rilatas al ago, kiu nun povus okazi. **Se vi estus veninta** rilatas al ago, kiu **estus** povinta okazi, do al ago, kiu ne plu povos okazi.

Cl.- Kiam oni distingas tiujn du aferojn, tiam oni iom bedaŭras la stilan pezecon de la **us-inta-**formo, kaj aŭtomate ekprovas la **intus-**formon, kiu estas pli flua.

A.- Cetere ni revenos foje al tiuj stilaj demandoj.

Cl.- Vi aŭdis babiladon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-